

## & Konvena ĉapelo:

< Rekante 14 el 42 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Flóvin Bænadiktsson.>

### (#Melodio:

<:42> (# Flóvin Bænadiktsson:

/so so so so mi rere do mi;mi mi rere mi fafa la so; so so so so mi rere do mi;mi mi rere mi fafa la so;

(#Rekantaĵe: sofa mi re re; remi fa la so; sofa mi so o do Iso)

)×7 +)

### (&Strofoj:

'1 /Min kaptis sufoka kolero, ; Ĉar mia edzino konfesis, ; Ke ĝis la tutlasta monero ; Por robo ŝi ĉion elspezis!

(×:; **Lasu min dormi ; sur via brako, riĉa jununjo2.)**

'2 De ŝvita monato la gajnon ; Ŝi pro koketemo malŝparis ; Kaj poste neniel nur ŝajnon ; De penta pripento ŝi faris!

.....

'3 Mi tial malfermis la kluzon ; De ĉiuj insultaj fivortoj, ; Riproĉis al ŝi la misuzon ; De miaj laboraj virfortoj; –

.....

'4 Responde ŝi kontraŭdisputis ; Ĵurante ĉe l' kruco de Kristo, ; Ke kontraŭ virin' mi kondukis ; Sen kor', kiel vir-egoisto!

.....

'5 Kaj plue ŝi kriis laŭtplore, ; Ke de nun ŝanĝiĝos l' afero, – ; Ŝi iros tuj for kaj samhore ; Ŝi mortos sen mi, en rivero! .....

'6 Kaj vere, ŝi tuje sin vestis; Por iri kaj morti sen danko, ; Sed jen, ŝi ekhaltis kaj restis ; Senmove medita ĉe l' ŝranko .....

'7 Mi tiam demande incitas: ; "Do, ĉu vi ne iras, anĝelo??" ; "Jes, tuj! – Mi nur iom hezitas, ; Ĉar mankas konvena ĉapelo!" .....